Minutes of the Annual General meeting of New Zealand Esperanto Association.
which was held at St Francis Retreat Centre, in Hillsborough, Auckland at 09.30 hs on Sunday the 19th of January 2014.

Protokolo de la ĉiu-jara ĝenerala kunsido de NZEA kiu, **okazis en St Francis Retreat Centre, Hillsborough, Auckland en dimanĉo la 19an de januaro 2014 je 09.30h**

Ĉeestantaro:

Naŭ (9) anoj kun voĉdonrajto:
Rouan van Ryn, Chris Krageloh, David Ryan, Erin McGifford, Ivan Pivac, Bradley McDonald, Howard Gravatt, Dave Dewar, John Calder

kaj du vizitantoj (ne membroj) - Bharat Ghimire kaj Maria Borissenko

Bedaŭresprimoj: Donald Rogers, Lavenda (BaoKehui), Celina Ryan

Protokolo de la pasinta ĉiu-jara kunsido. akceptita

Forpasis ano s-ino Gwenda Sutton. (NZEA ĵus ricevis tiun novaĵon)

Treasurer's Report:
David Ryan distributed financial statements.

That the financial report (the financial statements) be accepted and approved:
(1). David Ryan (2). C. Krageloh ; Agreed.

That the 2013/2014 financial statements be sent to an independent qualified person for review. (1) . D Ryan (2). H.Gravatt ….. carried.

Raporto de la prezidanto.

Chris Kragelo, interalie menciis pri Vintra Renkontiĝo (Newmarket in July)
Nuntempe 35 anoj de NZEA
Pri popolnombrado - NZ Census - rimarkinda 108 parolantoj de Esperanto.

Ke la raporto de nia prezidanto estu akceptita: (1)Rouan van Ryn (2) John Calder.
Akceptita

Election of Estraro por jaro 2014-2015.
Elected were:
Prezidanto - Chris Krageloh
Vic-Prez. - Ivan Pivac
Sekretario - Bradley McDonald
Help-sekretario - Rouan Van Ryn
Kasisto - David Ryan
Membro - Erin McGifford

Discussion about where and when to have next year's congress (and AGM). Concensus is that in 2015 it will be in Australia, a "kuna kongreso" (joint congress) with the Australian Esperanto Association (AEA).

Additionally, we propose an event in 2016 in New Zealand. The 2016 event will likely be a combined 'interlinguistics conference' and joint AEA/NZEA congress.

Prezidanto Kris Krageloh dankis al ĉiuj kaj fermis la kunsidon je 11.10 h.

NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

Komisiito pri Scienco: Donald Rogers

Adreso: 47 Trafalgar Street, Lower Hutt

Telefono: (04) 586 2596

Retadreso: donr2648@clear.net.nz

AGADO PRI SCIENCO KAJ TEKNIKO – 2014

Enkonduko

Mi verkis por LibreOffice, Monato, Vikipedio, kaj por la retejo de NZEA. Mi ankaŭ provlegis kelkajn numerojn de *Esperanto sub la Suda Kruco*.

La retejo de NZEA

Grava parto de nia retejo estas tiu pri kiel tajpi komputile en Esperanto. Ĝi enhavas informon pri ne nur Vindozo, Makintoŝo kaj Linukso, sed ankaŭ pri Android kaj iOS (por plurfunkciaj poŝtelefonoj). Estus avantaĝe pli diskonigi nian retejon. www.esperanto.org.nz

Monato

Du miaj artikoloj pri politikaj eventoj en NZ aperis en *Monato*. monato.esperanto.be

Vikipedio

Dum la jaro mi kontribuis al 18 artikoloj. eo.wikipedia.org/

LibreOffice

La volontuloj publikigis du novajn versiojn dum 2014: versiojn 4.3 kaj 4.4. Por ĉiu versio ni devas traduki aŭ kontroli multajn tekstojn kiuj vidiĝos en la fasado, mesaĝoj ktp. eo.libreoffice.org

Silverstripe

Silverstripe estas programaro por mastrumi tekstojn, bildojn ktp en retejo. Ĝiaj programistoj estas bazitaj en Nov-Zelando. Mi esperantigis la fasadon por ĝi denove por la nova versio. www.silverstripe.com

Eventoj en Esperantujo dum 2014

IKU

Unu el la plej interesaj sesiaroj dum Universala Kongreso estas la Internacia Kongresa Universitato (IKU). En la revuo *Esperanto*, sep. P 183, Francesco Maurelli argumentis ke "IKU stimulas terminologian laboron, kaj pliriĉigon de la esprimpovo de la lingvo... Kaj kiu estus plej trafa maniero por konvinki homojn, ke Esperanto funkcias ol montri ke ĝi funkcias, ke sciencistoj uzas ĝin, ke fakaj grupoj uzas ĝin, male ol nurvorta blablaumado pri la beleco de nia internacia lingvo?"

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Ĉe ĝia retejo oni povas aboni kaj legi la revuon. Ĝi enhavas arkivon de la revuo por la jaroj 1949 ĝis 2011. Unu numero de *Scienca Revuo* aperis dum 2014.

scienca-revuo.info

La Akademio Internacia de la Sciencoj (San Marino)

OProf. Hans Michael Maitzen estas prezidanto de AIS. Oni devos ekekti novan senaton en 2015 por gvidi la Akademion. www.ais-sanmarino.org

Vikipedio

Je la fino de oktobro 2014, la esperantlingva Vikipedio atingis pli ol 204000 esperantajn artikolojn. Ni bezonas multajn pli. eo.wikipedia.org/

Jarraporto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) por 2014
(10a de januaro, 2015)

Estraro de NZEA

La jenaj personoj elektiĝis por la Estraro dum la jarkunveno en Aŭklando en januaro de 2014, kaj daŭris kiel Estraranoj dum la tuta jaro.

Prezidanto	Chris Krägeloh
Vic-Prezidanto	Ivan Pivac
Kasisto	David Ryan
Sekretario	Bradley McDonald
Helpsekretario	Rouan van Ryn
Estrarano	Erin McGifford

La Estraro kunvenis kvar fojojn per telefono (lastatempe per *Skajpo*) kaj ofte korespondis per retpoŝto pri diversaj aferoj.

La jarkongreso en januaro 2014

Dum januaro 2014 okazis nia jarkongreso en Aŭklando – refoje ĉe la ege taŭga loko *St. Francis Retreat Centre*. Bedaŭrinde nur malmultaj homoj (proks. 12) ĉeestis la kongreson, kiu verŝajne estis la plej malgranda ĝis nun.

Kvankam la etoso estis bona, ni decidis ke ni nepre devas ŝanĝi la formaton kaj programon por allogi pli da partoprenontoj al venontaj kongresoj. Post iom da diskuto kun niaj gesamideanoj en Aŭstralio, ni decidis ke la venontaj du kongresoj estu kunaj kongresoj. La 2015an kongreson organizis la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA), kiu donis al ni iom da tempo *re-grupiĝi*. La 2016an kongreson organizos NZEA (vidu suben).

Kongreso kaj interlingvistika konferenco 2016

Por instigi pli da intereso je la 2016a kongreso, ni decidis okazigi la 2016an Esperanto-kongreson kun apartan internacian interlingvistikan konferencon (angle-lingvan). La laboro organizi ambaŭ eventojn estas preskaŭ same ol nur organizi la Esperanto-kongreson. La Esperanto-kongreso estos tri-taga afero, kaj la interlingvistika konferenco du-taga evento. La plejparto de la partoprenontoj ĉe la Esperanto-kongreso verŝajne ankaŭ interesiĝas pri interlingvistiko aŭ volas lerni pri tiu studfako. Aldone, okazigi la du eventojn kune ankaŭ donas al ni la eblecon montri Esperanton al ne-Esperantistaj partoprenontoj de la interlingvistika konferenco.

Por starigi allogajn eventojn, financa apogo necesas. Tiu ebligus nin reklami la eventojn pli vaste (inkl. al ne-Esperantistoj) kaj inviti eminentajn fakulojn por prezenti paroladon ĉe la interlingvistika konferenco. Chris Krägeloh petis monon de la usonbazita fonduso *Esperantic Studies Foundation*. Ili respondis favore, sed ĝis nun ne diris kiom multe da mono ili pretas doni al ni. Krom la aŭstralia kaj nov-zelanda Esperanto-asocioj, kompreneble, ankaŭ la Aŭklanda Esperanto-Societo eble pretus doni financan apogon.

Retpaĝaro de NZEA

Vicky Crickett de tempo al tempo ĝisdatigis la retpaĝaron de NZEA (www.esperanto.org.nz). Por la planita 2016a kongreso ni bezonas funkcian hejmpaĝon aŭ eĉ aldonan apartan hejmpaĝon.

Arĝenta Filiko

Arĝenta Filiko, kiun redaktas David Ryan, eldoniĝas dufoje dum la jaro. *Arĝenta Filiko* estas grava komunikilo por niaj membroj, kaj donas informojn pri venontaj kaj pasintaj Esperanto-eventoj en Nov-Zelando.

Esperanto sub la Suda Kruco (ESK)

ESK dissendiĝis al membroj de NZEA kaj AEA. La formato kaj aspekto restis tre belaj kaj okulfrapaj, kaj ESK enhavis kelkajn artikolojn el nov-zelandaj verkintoj. Tamen, estas necesa pli ofta kontribuo de artikoloj el Nov-Zelando. Dum 2014, la eldonado ne ĉiam funkciis glate, sed la problemoj ŝajnas esti solvitaj.

Financaj aferoj

Nia financa situacio estas tre stabila, je pli da enpezoj ol elspezoj. Bonvole vidu la apartan raporton de la kasisto.

UNANZ

NZEA restis kiel membro de UNANZ (Asocio de Unuiĝintaj Nacioj de Nov-Zelando). Bradley McDonald restis kiel reprezentanto de aliĝinta membro en la nacia estraro de UNANZ.

Ĝenerala konkludo

Mia konkludo por ĉi tiu jaro estas preskaŭ la sama kiel dum antaŭaj jaroj. Granda defio estas kiel disvastigi Esperanton en nia kompleksa mondo. Bonsanĉe, nia financa situacio estas tre bona, sed ni bezonas la ĵustan miksaĵon de freŝaj ideoj por realigeblaj agadoj kaj la tempon fari ilin.

Mi dankas la Estraranojn de NZEA kaj multajn aliajn membrojn, kiuj helpis diversmaniere dum la jaro. Ni ĉiuj estas tre okupataj en nia ĉiutaga vivo, sed ni sukcesas doni iom da nia tempo por aferoj pri Esperanto.

Chris Krägeloh
Prezidanto

2a Jarraporto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) por 2014 (28a de februaro, 2015)

Decidoj en Melburno pri 2016a kongreso

El Nov-Zelando, kvar esperantistoj ĉeestis la kunan kongreson en Melburno: Bradley McDonald, John Calder, Erin McGifford, kaj Chris Krägeloh. La kongresejo estis ege taŭga por okazigi tian eventon, kaj la programo kaj manĝaĵo plaĉis al ĉiuj. Tamen, estis kelkaj problemoj rilate la aliro al interreto. Ni planis jarkunsidon por sabato la 10an de januaro, kun aliĝo de aliaj NZEA membroj per Skajpo. Sed bedaŭrinde ni ne havis sukceson uzi la interreton—pro tio la nun alternativa jarkunsido per telefono.

La tri ĉeestintaj NZEA estraranoj diskutis kun siaj aŭstraliaj kolegoj pri la propono starigi kunan kongreson en Aŭklando kune kun posta interlingvistika konferenco. Estis iom da dubo ĉu la interlingvistika konferenco allogos sufiĉe da partoprenantoj, kaj iusence ni eble okazigus tiun eventon nur por la prestiĝo asocii Esperanton kun akademiaj esploradoj. Finfine, la estraro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) decidis kontraŭ la propono okazigi kunan (NZEA kaj AEA) kongreson en Nov-Zelando en 2016, kaj anstataŭ decidis kongresi en Indonezio (en la urbo Bandung) dum fino de marto 2016 (dum pasko).

Sen la subteno de AEA, plej verŝajne nur malmultaj homoj iros al 2016a kongreso kaj interlingvistika konferenco en Aŭklando, kaj oni decidis ne plu okazigi tiun eventon. Dum la jaro 2015, la NZEA estraro nun devas decidi ĉu ni kongresu ankaŭ en Indonezio aŭ ĉu ni okazigu apartan eventon.

Rezigno de la rolo de prezidanto

Post la kongreso, mi multe pensadis pri mia estonta rolo en la Esperanta movado en Nov-Zelando. Kiam ni estis diskutantaj la proponon okazigi interlingvistikan konferencon, mi diris ke ambaŭ decidoj (jes aŭ ne) havas bonajn aspektojn. Certe, per tia evento ni eble povintus instigi freŝan entuziasmon en la Esperanta movado en Nov-Zelando kaj ligi Esperanton al akademiaj cirkloj. Aliflanke, neokazo de la 2016a kuna Esperanto-kongreso kaj interlingvistika konferenco ankaŭ estas iusence bona novaĵo: Dum la lastaj jaroj ni certe povis rimarki malkreskon de aktiva membraro, kaj kiam ni ja organizis ion, certe estis stresega afero por la malgranda organiza teamo.

Mi ankaŭ devas pensi pri miaj personaj fortoj kaj malfortoj kaj kiel plej bone helpi la Esperanto-movadon. Per mi laboro, mi bone konas la “akademian mondon”, kaj de tempo al tempo trovas iom da tempo verki artikolojn pri interlingvistiko. Per tiu laboro, mi esperas ke mi povas montri Esperanton al aliaj akademianoj. Mi ankaŭ esperas ke tiu agado donas Esperanton iom da prestiĝo kaj kredindeco. Interlingvistika konferenco en 2016a estintus okazo fortigi tiun laboron, sed restas multaj aliaj indaj projektoj. Pro tio estas mia plano daŭrigi tiun laboron dum la venontaj jaroj. Tia laboro bezonas sufiĉan fokuson kiam samtempe mi devas atenti al diversaj aliaj familiaj kaj laboraj devoj. Tiu esplorada laboro verŝajne ankaŭ bezonos financan apogon, kiun mi intencas peti de NZEA. Se mi daŭre estos prezidanto aŭ eĉ Estrarano, tio fariĝus konflikto de intereso. Pro tiuj ĉiuj kialoj, mi decidis ne plu kandidatiĝi por la Estraro de NZEA.

Chris Krägeloh, Prezidanto